





tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo
Časopis Hrvatskog saveza za esperanto

junio 2016 / n-ro 127



-  Reta kurso de Esperanto laŭ *Zagreba Metodo* en dek lingvoj
-  *Oklingva medicina vortaro* de Jozo Marević aperis
-  Novaj ejoj por esperantistoj en Bjelovar kaj Zagrebo
-  Slovakio en la fokuso en la jaro 2016

Ministerio pri kulturo aprobis la monon por unu numero de Tempo en 2016. Do, jen ĝi! Ankaŭ Unuiĝo de nevidantaj esperantistoj ricevis rimedojn por la sona numero de Tempo. Renkontiĝo de verkistoj ĉi-jare ricevis 50% malpli da mono ol kutime, sed ĝi tamen povos okazi en septembro de la 16a ĝis 18a de septembro, kun la ĉefa gasto **Paul Gubbins** el **Britio**. La sama Ministerio aprobis ankoraŭ unu literaturan programon por Universala Kongreso de Esperanto en **Slovakio**: prelegon pri renkontiĝo de la kroata kaj slovakaj ampoezio, portanta la titolon laŭ la poemo de la slovakaj poeto **Lubomir Feldek** *Karesado antaŭ dormo*.

Ministerio pri kulturo ne plu regule finance kontribuas al agado de Kroata Esperanto-Ligo. Laŭ la iniciato de la prezidanto **Anto Mlinar**, pluraj membroj decidis finance regule helpi por provi efektiviĝi memfinancadon.

Kio okazis en la kroata Esperantujo ekde la lasta Tempo en oktobro 2015?

En novembro 2015 mortis nia meritplena membro **Lucija Borčić** al kiu ni ŝuldas tiom da tradukoj el la kroata literaturo kaj du Grandajn Esperantajn Vortarojn. Ĉi-numere ni kun danko adiaŭas de ŝi kaj memore publikigas ŝian foton sur la titolpaĝo (fotis **Ivan Spoljarec**).

En decembro ni okazigis, konforme al la nova Leĝo pri asocioj en **Kroatio**, la duan jarkunvenon en 2015. Ĝi okazis en la ejoj de Kroata Esperanto-Ligo en Knez Mislav la 14an de decembro 2015 kaj ĝin sekvis Zamenhof-festo dediĉita al **Vasilij Eroŝenko** en Biblioteko de blinduloj kaj malbonvidantoj en la strato Senoina 34.

En Kroata Fervojista Esperanto-Asocio **Roža Brletić-Višnjić** komencis gvidi Esperanto-Kurson la 9an de februaro 2016. **Tihana Mikša** sabate inter januaro kaj aprilo gvidis kurson por du membroj en Centro por blinduloj *Vinko Bek* Zagreb.

Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj ricevis la rajton uzi ejon en Radnički dol 1 kaj tie startis serion da sabataj renkontiĝoj de esperantistoj. Kadre de la laboro de la societo aparte elstaris eldono de du kajeroj: la kroatingva *Tomo Maretić en interkruciĝo de filologio kaj lingva politiko*, verkita de **D-ro Velimir Piškorec** kaj ĝia esperanta traduko fare de

Josip Pleadin. Kunlaboranto por la verko estis **Sanja Janković**. La kroatingva eldonaĵo havis sian prezenton ankaŭ en Zagreba Lingvistika Rondo la 15an de marto 2016.

Bjelovara Esperanto-Societo en aprilo 2016 ricevis ejon en la centro de **Bjelovar**, en la strato de **Ivan Vitez Trnski 12**. La posedanto de la ejo estas la urbo **Bjelovar**. Ni dankas al la urbo pro tiu nobla gesto. La unua internacia aranĝo organizata el la nova ejo estas la oktobra programo **Bjelovaraj esperantistoj al sia urbo** la 17an de oktobro 2016. En fokuso estos **Tibor Sekelj** pri kiu **Urba muzeo de Bjelovar** planas realigi gastadon de artefaktoj el la heredaĵo de **Tibor Sekelj** el la **Muzeo de Senta** en **Serbio**. Planata estas ankaŭ la Ronda Tablo pri **Tibor Sekelj**, samkiel la **Deklamkonkurso**.

Tre granda evento venas el **Velika Gorica**: **D-ro Jozo Marević** sukcesis finpretigi kaj eldoni imponan **Oklingvan medicinan enciklopedian vortaron** kun Esperanto kiel unu el la ok lingvoj. La verkon sur 3184 paĝoj eldonis Marka. La prezo de la vortaro estas 1400 kn. **Davor Klobučar** intervjuis la aŭtoron **Jozo Marević** fine de tiu grandega laboro.

Esperanto Societo Rijeka havis sian jarkunvenon dum kiu estis elektita nova estraro. La prezidanto estas **Nataša Batistić**.

En **Osijek** okazas preparoj por Internacia Esperanto-Konferenco, okazonta en tiu urbo de la 16a ĝis la 22a de julio 2016. La ĉeforganizanto surloke estas **Višnja Branković**. La konferencon organizas **Organiza Societo por Internaciaj Esperanto-Konferencoj-OSIEK**. La ĉi-jara temo de la konferenco estas *Landoj ĉe vojkruciĝo*

La 23an de aprilo Estraro de Kroata Esperanto-Ligo kunsidis kaj traktis interalie okazigon de la jarkunveno en siaj ejoj en Knez Mislav 11. Ĉar ni daŭre havas luanto(j)n en la ejoj de Vodnikova 9, la estraro decidis ankoraŭ ne translokiĝi al Vodnikova. La jarkunveno de Kroata Esperanto-Ligo okazis la 4an de junio 2016.

Vanja Radovanović gastis en Esperanto-Societo *Tibor Sekelj* la 13an de aprilo per prelego pri Renkontiĝoj de esperantlingvaj familioj kaj anoncis ke REF en 2016 okazos en **Fužine**.

Krom li, en la unuaj monatoj de la jaro 2016 prelegis **Mea Bombardelli** pri Speleologio kaj **Neven Kovačić** pri *Ekzota Karibio*. Esperanto-Societo *Tibor Sekelj* jarkunvenis la 4an de majo 2016. La sezono en la societo finiĝis per la prelego de Zlatko Tišljar.

Kroata komisiono pri UNESCO aganta kadre de Ministerio pri kulturo aprobis sian aŭspicion por nia agado en 2017 lige al omaĝo al la 100-jara jubileo de la morto de **Lazaro Ludoviko Zamenhof**. La aŭspicio permesas al ni uzi dum la aranĝoj la simbolon de UNESCO. La komisiono bedaŭrinde ne disponigas monon por tiaj aranĝoj kiuj efektivas la ideojn de UNESCO.

Ni plu kontribuas al traduko de originala Esperanto-literaturo al aliaj lingvoj: **Spomenka Štimec** subskribis kontrakton pri anglo de ŝia verko *Kroata Milita Noktlibro*. Eldonisto estas *Phoneme Media* de David Shook el **Los-Anĝeleso**. La verkon tradukas **Sebastian Schulman**.

Zlatko Tišljar atingis belan sukceson pri instruado de Esperanto per *Zagreba metodo*. Ĝi nun estas enretigita kaj je la dispono de lernemuloj en dek lingvoj. <http://eo.lernu.net/komunikado/foro/temo.php?t=19472> Atentigo pri nova kurso legeblas kiel: "Lern Esperanto in 12 Tagen": <http://learn.esperanto.com/de/>

Aktuale la instrulingvoj estas la angla, ĉina, franca, germana, hispana, irana, ukraina, indonezia, portugala kaj malaja, pliaj naŭ estas preparataj.

Bjelovar preparas interesajn programojn por sia urbo en oktobro, pri kio raportas **Grozdana Grubišić-Popović**.

En la vespero de la makedona poeto **Jovica Ivanovski**, okazigita en hotelo Aristos en Zagrebo la 6an de majo 2016, Ďivo Pulitika kaj **Damir Mikuličić** legis liajn versojn esperantigitajn de **Judita Rey Hudeček**, **Mihaela Cik** kaj **Božidar Brezinišćak Bagola**.

Esperanto-Societo *Trixini* en Hraščina okazigis la 28an de majo 2016 la dudekan Meteoritan Feston kun gastoj: profesoro d-ro **Dragan Damjanović** de la Filozofia fakultato en Zagreb, aktorino **Tajna Peršić** kaj operkantisto **Ivica Kontent**. La aranĝon financis la Departamento Krapinsko-zagorska.

Fondita en 1980. Ne aperis en la militaj jaroj 1993 kaj 1994. Aperas laŭeble kvar foje jare. Jaro XXXV, numero 127 (1-2016).

ISSN 0352-1583. Tiu ĉi numero estas eldonita per financa helpo de **Ministerio pri kulturo de Respubliko Kroatio**.

Tempo aperas sone sur kompaktdisko ĉe Unuiĝo de nevidantaj esperantistoj. Voĉlegas Neven Kovačić.

Redakcio/Uredništvo; **Eldonisto**/Izdavaĉ: Hrvatski savez za esperanto/Kroata Esperanto-Ligo, Kneza Mislava 11/III, HR 10000 Zagreb, Kroatio, tel. +385 (1) 4617550, poŝ.tel. +385 (91) 4617550; esperanto@zg.t-com.hr, www.esperanto.hr

IBAN HR6124840081100881157; OIB 53992829935

Kontribuis: Željka Anić, Stefanija Bahun, Lucija Bilčić, Lucija Borčić, Roža Brletić-Višnjić, Višnja Branković, Božidar Brezinišćak Bagola, Mihaela Cik, Franjo Forjan, Davor Grgat, Grozdana Grubišić-Popović, Georg Jaehning, Anne Jausions, Davor Klobučar, Katalin Kovats, Eric Laubacher, Edmond Ludwig, Milkica Lukić, Dinko Matković, Anto Mlinar, Judita Rey Hudeček, Velimir Piškorec, Olga Štajdohar-Paden, Dalibor Seatović, Ivan Spoljarec, Spomenka Štimec, Vanja Radovanović, Krno Tišljar, Zlatko Tišljar, Mirjana Žeželj.

Redaktoris: Spomenka Štimec. **Grafika aranĝo kaj prespreparo**: Ivan Spoljarec. **Presis**: Urednik d.o.o., Zagreb

Anoncartarifo: 1/1 paĝo 1000kn (135 eŭroj), 1/2 paĝo 500 kn (68 eŭroj, lasta titolpaĝo 2500 kn (3.28 eŭroj)). **Abono** por 4 numeroj jare 60 kn.

Por eksterlando 10 eŭroj. Unuopa numero enlande 15 kn, eksterlande 3 eŭroj.

La redakcio ne respondecas pri la opinioj de la subskribitaj artikoloj.

Foto sur la titolpaĝo: Lucija Borčić (1983). Fotis Ivan Spoljarec - Stef.

Nia membro **Tea Kučinac** malkovris en la arkivoj en **Vieno** belan kolekton de bildkartoj pri Zagrebo kiuj portas esperantlingvaj klarigojn.

Ni perdis en la jaro 2016 du tre valorajn membrojn: **Stanislav Rukelj** el **Majerje** (forpasis la 25an de januaro 2016) kaj **Dinko Matković** el **Vrboska** sur la insulo **Hvar** (forpasis la 24an de februaro 2016). Per kio ni anstataŭigos ilian kontribuon al Esperanto?

Esperanto-Societo **Trixini** el **Hraščina** havis sian jarkunvenon la 18an de junio. Ĝi ricevis de la Departemento Krapinsko-zagorska 2.000 kn por la aŭtuna numero de Tempo. La societo preparas kunlabore kun Asocio de verkistoj de la Departemento Krapinsko-zagorska, kies sidejo estas en la urbo **Klanjec**, elekton el la esperantlingvaj verkoj de **Spomenka Štimec** en amplekso de 230 paĝoj. La libro eniris programon de la tutkroata aranĝo *Monato de la libro* en Zagorje.

Nia membro **Olga Štajdohar-Paden** publikigis interesan libron al kiu kontribuis nur virinoj, rakontantaj pri io pri kio ili fieras. Pluraj esperantistinoj estas inter la aŭtorinoj.

Ni prezentas al vi imponan liston de kontribuantoj de la helpo por Vodnikova 9 pagintaj dum la lastaj monatoj. La ŝuldo por la lasta kredito restas en junio 2016 entute 11.663,31 eŭroj.

Davor Grgat lanĉis en aprilo en **Split, Sinj** kaj **Omiš** – kolekton de artikoloj pri alkoholismo. Esperanto estas en ĝi plurfoje menciita. La artikoloj estis antaŭe publikigitaj en *Alkohologia Heroldo/Alkohološki glasnik*. La eldonisto estas *Kroata ligo de kuracitaj alkoholuloj* kaj *Ligo de kluboj de kuracitaj alkoholuloj en Zagrebo*.

Multaj niaj petoj al diversaj instancoj estis bedürinde rifuzitaj. Ni ankoraŭ vidos ĉu ni sukcesos per du niaj projektoj ĉe Europa Komisiono.

Intertempe, niaj membroj preparas sin por la julia partopreno en Universala Kongreso de Esperanto en **Nitro**, kaj por la samlokaj Konferenco de medicinistoj-esperantistoj, Internacia Kongreso de Nevidantaj Esperantistoj kaj Internacia Infana Kongreseto. **Andreja Horvat** veturos septembre al **Rio de Janeiro**, kiel helpanto en Paraolimpikaj ludoj.

Ni prezentas al vi belan akiraĵon por nia arkivo el la jaro 1914 - la afiŝon de (la neokazinta) Universala Kongreso de Esperanto el 1914, ricevitane de **Milkica Lukić** el **Hrvatska Kostajnica**.

Bonvenon la 17an de septembro al **Hraščina**, al Renkontiĝo de verkistoj por renkonti inter aliaj gastoj la verkiston **Paul Gubbins** el **Britio**.

Bonan legadon!

S. Štimec

Kiam Internacia Kultura Servo en Zagrebo en 1979 laŭ la iniciato de **Zlatko Tišljar** lanĉis stencilitajn materialojn por siaj lernantoj, bazitaj je 500 radikoj de la parola Esperanto, oni apenaŭ pensis ke tiuj materialoj akiros 9 eldonojn en la kroata lingvo kaj tridekon da paperaj eldonoj tra la mondo, famiĝinte kiel la Zagreba metodo de la Esperanto-instruado.

Jen preskaŭ 40 jarojn post tiu evento, nova kunlaboranto, la germana programisto **Georg Jähnig** el **Berlino** kolektis sian internacian teamon kaj kreis la programon kiu faciligis al liaj kunlaborantoj tradukadi la kurson. Jam la kurso estas tradukita al dek lingvoj kaj daŭre estas tradukata al pliaj. Nun la lecionoj el la zagreba lernilo estas alireblaj en la lingvoj germana, angla, franca, hispana, ĉina, irana, ukraina, indonezia, portugala kaj malaja.

Ĉe la unopaj lecionoj la lernantoj povas vidi kaj aŭskulti en bona prononco la tekston, povas trovi ankaŭ la novajn vortojn, klarigojn pri la rilata gramatiko kaj solvi kelkajn interagajn ekzercojn. Al la lecionoj aldoniĝas ankoraŭ kelkaj resummaterialoj ekz. la korelativa tabelo, listo de propozicioj, afiksoj kaj kelkaj laŭtemaj vortlistoj. En la vortostoko de la materialo eblas serĉi laŭ la dek lingvoj. La programo estas libere uzebla kaj komputile kaj en saĝtelefonoj.

Vidu ĝin ĉe <http://learn.esperanto.com/de>

Kroata Esperanto-Ligo dankas al **Georg Jähnig** kaj liaj kunlaborantoj pro tiu nova impulso por la Zagreba Metodo.

Krome alia esperantisto el **Usono**, **Enrique Elemborg** kreis jam antaŭ jaroj paĝaron en kiu troviĝas ĉiuj materialoj de la Zagreba Metodo por la lingvoj angla kaj hispana, <http://esperantofre.com/zagreb/zmkanto.htm> kaj ĉiuj aldoniĝoj (kantoj, *La sentimulo*, *Esperanto ne estas nur lingvo*, la bildstrio ktp). Tiuj du retejoj kompletigas sin reciproke kaj do enrete nun eblas lerni laŭ la Zagreba Metodo per ĉiuj de ni en **Zagrebo** kreitaj materialoj kun ekzercoj interaktive uzataj.

Bonvolu vidi kaj rekomendi al aliaj homoj ankaŭ la paĝon de KEL <http://www.esperanto.hr/zagreba.htm> kun ĉio pri la Zagreba Metodo, inkluzive ankaŭ la unuajn 8 lecionojn, kiujn jam en 2002 enkomputiligis (kaj iom pliriĝis) Davor Klobučar.

Katalin Kovats / Zlatko Tišljar

Aŭtoroj de la Zagreba Metodo en la reto

La aŭtoroj de la *Zagreba metodo* estas:

Zlatko Tišljar
Spomenka Štimec
Ivan Špoljarec
Roger Imbert

La retejon programis: **Georg Jähnig**

La ciferecigon faris laŭlingve:

Germana: **Sebastian Hartwig**, **Georg Jähnig**
Angla: **Georg Jähnig**, **Spencer van der Meulen**,
Baptista Sivanzire

Franca: **Axel Rousseau**, **Emmanuelle Richard**

Hispana: **Enric Baltasar**, **Alejandro Escobedo**

Malaja: **Onklo ENG**

Ĉina: **Onklo ENG**, **Wen-ch'i Chao**

Taja: **Warut Bunprasert**

Turka: **Vasil Kadifeli**, **Fatih Emre**

Kroata: **Zlatko Tišljar**

Portugala: **Emilio Cid**, **Túlio Flores**, **Jairo Augusto Dos Santos**,

Paulo Amariz, **Matheus Arantes Pacheco**, **Cicero Soares**,

Frederico José Andries Lopes, **Fabricio Valle**

Sono: **Emilio Cid**




Georg Jähnig



Habent sua fata libelli

(knjige imaju svoj usud / libroj havas sian propran sorton)

En aprilo 2016 aperis *Oklingva medicina enciklopedia vortaro (Osmojezični medicinski enciklopedijski rječnik)* de la aŭtoro Jozo Marević el Velika Gorica. La eldonisto estas Marka el Velika Gorica, kaj sur 3.200 paĝoj (21x30 cm) prezentitaj estas 50.000 vortoj, esprimoj kaj mallongigoj. La menciitaj ok lingvoj estas: la latina, kroata, angla, germana, franca, itala, hispana kaj Esperanto. Intervjuon kun nia samideano Marević por KEL faris Davor Klobučar.



D.K.: S-ro Marević, la libro aperis en aprilo 2016, sed oficiale ĝi portas la eldonjaron 2015. Kiel tio?

J.M.: Tre bone vi tion rimarkis. Laborante pri ĉi materialo dum jaroj, mi antaŭvidis kaj firme decidis fini la laboron en 2015. Sed ĝis tiam ni ne trovis la necesan monon. Tamen, intence mi lasis la jaron 2015.

D.K.: Medicino ne estas via fako. Kial do vi decidis vortarumi ĝuste pri medicino?

J.M.: Mia fako estas la lingvoj germana kaj latina. Medicinon mi elektis ĉar laŭ mia opinio ĝi estas la plej humana el ĉiuj sciencoj. Kaj ĝi daŭre evoluos – dum ekzistas homoj, medicino ĉiam alfrontos novajn defiojn; ĉiam denove aperados iaj novaj virusoj, bakterioj kaj sekve ankaŭ novaj malsanoj kiuj en komenco ŝajnos nekuraceblaj.

D.K.: Diru al ni, mi petas, iom pri via vivo kaj kariero.

J.M.: Mi naskiĝis en 1940 apud Metković (suda Kroatio). Post baza lernejo en Opuzen kaj klasika gimnazio en Dubrovnik, mi diplomigis pri la germana lingvo kaj literaturo kaj pri la latina lingvo kaj literaturo en Filozofia Fakultato en Zadar. Mi laboris en lernejoj, kaj poste en la granda eldonista firmao Školska knjiga, kie mi longan tempon gvidis la socian-humanistikan sektion. Mi estas membro de multaj asocioj, preleginto en multaj seminarioj kaj konferencoj, kaj aŭtoro de multaj fakaj libroj, artikoloj kaj sciencaj verkoj el pedagogio, historio kaj precipe klasika filologio. Ekz. mi organizis tri internaciajn sciencajn simpoziojn pri Bleiburg kaj la kroata „kruca vojo“ el 1945. Mi membras en Kroata-germana asocio en Zagreb kaj Germana-kroata asocio en Hamburg. El miaj sciencaj verkoj mi menciu *Sankta Paŭlo sur la insulo Mljet*, post kiam mi tradukis grandegan traktaton de Ignjat Djurdjević el la lingvoj latina, greka kaj itala sub la sama titolo (pri historia ŝippereo de sankta Paŭlo apud la kroata insulo, teksto en *Hrvatsko neretvanski zbornik*, 2009), kaj el miaj libroj mi nepre menciu *Kroatan-latinan enciklopedian vortaron* el 1977 (*Hrvatsko-latinski enciklopedijski rječnik*) kaj Latinan-kroatan enciklopedian vortaron el 2000 (*Latinsko-hrvatski enciklopedijski rječnik*), pro kiuj mi ricevis premiojn.

D.K.: Kia estas la strukturo de ĉi vortaro kaj kiel oni uzos ĝin?

J.M.: La ĉefan parton konsistigas la tuto el 50.000 leksikaj unuoj en la latina lingvo, en alfabeto ordo, kaj apud ĉiu unuo (vorto, sintagmo, mallongigo) troviĝas tradukoj al aliaj sep lingvoj, kun mallongaj klarigoj de signifoj, kie tio estis utila. Kiu konas la latinan, aŭ almenaŭ supozas kiel iu termino devus aspekti latine, tiu povas rekte traduki la deziritan terminon al aliaj 7 lingvoj. Kiu ne konas la latinan sufiĉe, tiu povas uzi la indeksojn en la lingvoj kroata, germana kaj angla, kiuj ankaŭ troviĝas en la sama libro. Tiel li/ŝi venos al la latina termino, kaj pere de ĝi al la aliaj lingvoj.

D.K.: Do, iun esperantan medicinan vorton ni ne povas traduki ekzemple al la germana lingvo ĉar ne ekzistas aparta esperanta indekso/suplemento?

J.M.: Se intereso aperos, oni povas iam el la uzitaj esperantaj terminoj krei esperanto-latinan suplementon. Ĝi estus aparta libro kiu akompanos ĉi tiun oklingvan vortaron, kaj trans la latina lingvo oni venus al tradukoj en aliaj 6 lingvoj. Same kiel pri Esperanto, ni povus diri ankaŭ pri la franca, itala kaj hispana lingvoj. Mi kredas, ke en ĉi momento la kroata, angla kaj germana indeksoj pli-malpli sufiĉas por ĉiuj praktikaj bezonoj.

D.K.: En la mondo estas granda nombro da plurlingvaj vortaroj, ankaŭ el la medicina fako, kion mi konstatis en interreto. Kaj mi aŭdis pri la angla-esperanta vortaro en 2001, kies aŭtoro estas la japano Saburo Yamazoe.

J.M.: Jes, estas konate, ke ekzistas plurlingvaj medicinaj vortaroj (ekz. ĉina-angla-franca-esperanta), sed kun tre limigita nombro da terminoj. Kaj la prilaboritaj terminoj estas ĉefe nur tiuj bazaj. Estas ankaŭ la seplingva vortaro de Kostić kun ĉ. 11 000 terminoj, kun tradukoj al la serba lingvo, sed sen iaj aldonaj klarigoj.

D.K.: Kiuj estas avantaĝoj de via vortaro, krom tio ke ĝi enhavas eĉ 8 lingvojn, inter kiuj estas – por ni karaj – lingvoj kroata kaj Esperanto?

J.M.: La vortaro havas 50.000 medicinajn kaj paramedicinajn unuojn, oni citas laŭbezone la grekan originalon, klarigoj estas donitaj kroatlingve. Laŭ ĉio tio, kaj laŭ ĝia amplekso oni vere povas diri, ke tio estas unika kaj la unua tiaspeca medicina vortaro en la mondo.

D.K.: Mi verkis iom da negrandaj libroj kaj tamen estis ege malfacile solvi ilian financadon, eldonadon kaj vendon. Kaj via libro havas 3.200 paĝojn, kosta 1.400 kunaojn (preskaŭ 200 eŭrojn) kaj estas destinita al nur unu fako. Laŭ mia supozo, ĝi nepre devis esti financa katastrofo, ĉu?

J.M.: Ah, kion mi diru al vi? La urba estraro de Zagreb finance multe helpis, sed mi devis preni ankaŭ konsiderindan bankan krediton.

D.K.: Kaj kiom da tempo vi uzis por la verkado?! Cetere, kiel vi entute trovis ĉiujn ĉi terminojn kaj tradukojn?

J.M.: Mi studadis multajn antaŭajn vortarojn kaj tiel mi kunmetis ĉi tiun. Por la esperanta parto min tre efike helpis PIV. Mi taksas, ke la verkado daŭris pli ol 10 jarojn, kaj pli ol 12.000 laborhorojn. Ho, kiom ofte mi devis forlasi agrablan societon en kafejo pli frue ol mi ŝatis, nur por povi finlabori mian tiutagan kvanton da vortoj. Kiel mi diris en televida intervjuo por HTV-4 (la ŝtata televido, 26-an de aprilo 2016), ĉi tian laboron faras nur frenezuloj, kaj ne normalaj homoj...

D.K.: Esperanto - kial, de kiam? Kiuj viaj esperantaj agoj kaj spertoj estas por vi la plej gravaj?

S-ro Marević dum TV-elsendo la 26an de aprilo 2016.
Fotis Davor Klobučar



J.M.: Esperanto allogis min jam dum servado en la „antaŭa“ (t.e. jugoslavia) armeo en 1962, ĉar mi, kiel multaj aliaj homoj, precipe tiuj junaj, alprenis esperantajn sanktajn ideojn kaj mesaĝojn. Poste mi finis ĉiujn kursojn kaj seminariojn en Primošten, partoprenis en multaj internaciaj esperantaj kunvenoj, ofte kun propraj verkoj. Hodiaŭ min pleje ĝenas la fakto, ke en nian esperantan movadon enpuŝas sin (psike) malsanaj homoj kiuj, volante nepre esti (vic)prezidantoj en esperantaj societoj, kaj estante nekapablaj eldiri almenaŭ unu frazon en Esperanto, iom post iom forpelas el la societo ĉiujn aliajn homojn. Mia opinio tio estas la plej granda kaŭzo de nesukceso en popularigo de nia movado.

D.K.: S-ro Marević, mi ne scias ĉu mi prefere deziru al vi multe da plia sukcesa laboro, aŭ multe da ripozo. Dankon pro la intervjuo!

J.M.: Oni neniam haltu!

Intervjuis Davor Klobučar

La TV-esendo spekteblas per http://www.esperanto.hr/marevic_2016_htv4.mpg

Ĉiu klera esperantisto scias ke la neokazinta Universala kongreso de Esperanto en la jaro 1914 ŝanĝis la sorton de Esperanto: esperantistoj vojaĝintaj al la kongreso de Esperanto en Parizo en 1914 ne povis kongresi. Okazis nur la unua ero – akcepto kaj transpreno de la materialoj. Post kiam en **Sarajevo Gavrilo Princip** mortpafis la aŭstri-hungarian tronheredinton **Franz Ferdinand**, la plej kruela milito ĝis tiam okazinta interrompis la evoluon de Esperanto. Esperantistoj de la kongresa urbo devis reveni hejmen. **Parizo** estis afiŝita por la kongreso sed preskaŭ neniu vidis la afiŝojn. Pli gravis la milito.

Kroata Esperanto-Ligo ricevis por sia arkivo la kongresan afiŝon de la jaro 1914. Kie estis la afiŝo dum la pasintaj cent jaroj? Ha, se ĝi kapablus rakonti!

La afiŝon donacis al **KEL Milkica Lukić** el **Hrvatska Kostajnica**, heredinto de la materialoj de **Antonija Jožičić**.


Kie **Antonija** havigis la afiŝon, ne estas konate. Kiel la afiŝo alvenis al **Kostajnica**? Sur la dorso ĝi portas la daton: de la jaro 1930. Ĉu eble **Mavro Špicer** alportis ĝin donace, veninte al **Kostajnica**? Kiam la familianoj de **Milkica** devis en la lasta milito forlasi **Kostajnica** kaj rifuĝi en **Bosnion**, ŝia filo, dezajnisto, kunportis la belan afiŝon kun si... Kiam la milito finiĝis, la afiŝo revenis al **Kostajnica**.



S. Ŝtimec

Pri tio mi vere fieras!

Pri tio mi viere fieras estas la titolo de la libro kiun kreis nia membro **Olga Ŝtajdohar-Pađen**. Olga naskiĝis en **Sisak**, diplomigis pri elektrotekniko. Ŝi estis membro en Studenta Esperanto-Klubo kaj aktivis en la Drama Grupo de SEK. Esperanton ŝi lernis en la kurso de **Duŝanka Halužan** kaj per la teatraĵoj gastis en pluraj lokoj en **Kroatio**, en **Parizo** kaj **IJK** en **Krakovo**, interalie kiel aktorino en la teatraĵo *Insektoj*.



En la libro ŝi stimulis sesdek du virinojn verki pri io je kio tiu koncerna virino fieras. Estas interese ke al la libroj kontribuis ankaŭ ses esperantistinoj: **Željka Anić**, **Milena Grgić**, **Vesna Hitrec**, **Ankica Jagnjić**, **Olga Ŝtajdohar-Pađen** kaj **Spomenka Ŝtimec**.

La libro havis plurajn prezentojn en **Zagrebo**, **Split**, **Virovitica**, **Trogir**, **Solin**, **Sisak**. La 13an de januaro 2016 **Olga** kun la virina teamo gastis en Esperanto-Societo **Ĥibor Sekelj** en **Zagrebo** kaj por la unuan fojon prezentis la libron. Pluraj ĵurnaloj publikigis informojn pri la libro. HTV intervjuis **Olgan Ŝtajdohar-Pađen** pri la libro, samkiel Kroata radio.

La libro estas prezentota en Renkontiĝo de verkistoj la 17an de septembro 2016. Ni publikigas unu ĉapitron de la libro verkitan de **Željka Anić**.

La titolpaĝon de la libro kreis **Biserka Klarić**.

S.Š.

Fotoj kaj detaloj ankaŭ ĉe http://www.esperanto.hr/programo_tibor.htm (serĉu la januaron 2016).

Mi protektis mian infanon

Ĉu mi estas fiero? Mi ne certas. Ĉiu tago estas lukto kontraŭ propra malperfekteco. Kaj mi volus ke ĉio estu perfekta. Sed ne estas. Ne estas perfekta. Sed, kiam mi pli reale rigardas min kaj kiam mi aŭskultas, ne nur aŭdas, sed vere aŭskultas homojn kiuj ĉirkaŭas min, mi haltas kaj ekpensas: do kion mi postulas de mi mem?

Kun ĉiuj laŭdoj de miaj profesoroj mi findiplomiĝis en ne tiom facila fakultato, kunlaborantoj ŝatas aŭskulti mian opinion. Oni diras ke mi bone laboras. Ili ne havas ideon pri malsano kiun mi portas. Tamen, tio ne estas fonto de mia fiero, tio estas nur eterna lukto kaj deziro ke estu pli bone.

Profunde en mi estas la fiero pri mia infano. La fiero pri la tago kiam mi akiris forton kaj kun eteta pakajeto en flava lankovrileto fuĝis de la edzo. En la nokton. Mi ne povis resti. Mi toleris humiligojn pri propra senkapableco, sed mi ne volis ke li pelu min aŭskulti ploron de mia infano. Ĉar li devas esti la unua. Ne. Tion mi ne permesis al li. Ĉu mi estas fiero? Mia korpo permesis ke ĝin loĝigu grava diagnozo, sed mia kapo ne. Mi protektis mian infanon. Mian nun jam plenkreskan infanon.

Željka Anić, simpla stomatologo, patrino de belega filino

17-an de januaro 2015

Esperantigis Mihaela Cik



Lanĉo de la libro en Kroata Esperanto-Ligo. Fotis Kruno Tišljar

Fervojistoj en la novaj ejoj

Agado de fervojistoj en la nova ejo, Trnajska cesta 11f, Zagreb

La 14an de junio 2016 okazis ekzameno por la kursanoj en la novaj ejoj de Kroata Fervojista Esperanto-Asocio en **Zagreb** kaj finiĝis la sezono de mardaj kunsidoj antaŭ la someraj ferioj. La societanoj renkontiĝas ĉiumarde. En 2016 prelegis pri Esperanto, la ĝenerala kulturo, respektive pri la fakaj fervojistaj temoj **Boris Ĉović**, **Marijan Benc**, **D-ro Zlatko Hinšt**, **Marica Brletić**, **Roža Brletić Višnjic** kaj **Teodor Mikić**

Roža Brletić-Višnjic



UZE aktivas en la novaj ejoj

Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj (UZE) okazigas ekde la 12-a de decembro 2015 siajn programojn en la nova ejo ĉe la adreso: **Radnički dol n-ro 1**. Tiun ejon al ĝi disponigis la zagreba urba kvartalo Gornji grad – **Medveščak**, respektive la Loka komitato **Ivan Kukuljević – Sakcinski**.

UZE okazigis en siaj ejoj riĉajn monatajn programojn, kiu la 9an de januaro 2016 komencis per prelego de **Josip Pleadin** pri *Stato kaj perspektivoj de Esperanto en Kroatio*. La 13-an de februaro okazis aparte ampleksa kaj bone vizitata programo dum kiu bjelovaranaj invitatoj nin festi-

vali en 2017 kaj estis prezentita la nova numero de la Zagreba Esperantisto, duobla numero 32-33. En la fokuso estis du novaj libroj eldonitaj de UZE en Esperanto kaj en la kroata lingvoj de **Tomo Maretić** kun la titolo *Tomo Maretić en interkruciĝo de filologio kaj lingva politiko*.

La publiko povis aŭdi pri la programo planata por oktobro 2016 *Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo*. Ni ricevis informojn pri la planata komuna vojaĝo al Universala kongreso de Esperanto en **Nitra, Slovakio**.

La 21-an de majo mi partoprenis tre sukcesan programon de UZE dum kiu **prof. d-ro Jozo Marević**, la aŭtoro, promociigis sian plej gravan verkon *Oklingva medicina* enciklopedia vortaro. Pri ĝi promociie parolis **Radenko Milošević**, prezidanto de UZE kaj **Josip Pleadin**, ĉeforganizanto de la tuta programo. Sekvis programero pri **INTER-FEST** kiun preparas kvar Esperanto-societoj en la jaro 2017 en **Bjelovar**.

Anto Mlinar



Fotis Lucija Biličić

OSIEK en Osijek

Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj (OSIEK) estas internacia societo kiu okupiĝas pri la organizado de kulturaj aranĝoj (IEK), kiuj okazas ekde 1988, unu jaron post la kreado de la asocio. Por ebligi valorajn interŝanĝojn kaj familian etoson la nombro de partoprenantoj en IEK estas limigita. La revuo *La Gazeto* estas ligita al la asocio.

Kelkaj famaj IEK okazis, por citi nur kelkajn, en Proprad (Slovakio), Ateno (Grekio), Wuhan (Ĉinio). La lastan en Braŝovo (Rumanio) majstre organizis Rodika Todor. Lastjare okazis nur la Ĝenerala Asembleo, en Lillo (Francio), pro la preparado de UK 2015.

Ni jam rekontiĝis en Kroatio: en Motovun en 2000. Denove ni kunvenos en via ŝatata lando, en Osijek, de la 16a ĝis la 22 de julio 2016, kaj karavano estos organizita por atingi la urbon de la venonta UK, Nitra (Slovakio).

Matene okazos prelegoj pri la temo «Lando ĉe vojkruciĝo», kaj prelegos interalie Spomenka Štimec! Postagmeze, turisma programo, kaj vendrede, fine de la semajno, post la Ĝenerala Asembleo venos la atendata momento de la voĉdonado por atribui la OSIEK-Premion. La kvin verkoj plej ofte proponitaj de OSIEK-membroj, senvualigitaj la 1an de julio en *La Gazeto*, estos prezentitaj en la komenco de IEK.

Do, ni ŝatus se legantoj de *Tempo*, kiujn mi eble jam havis la plezuron renkonti en Nieguš en 2012 okaze de la prezentado de mia franca traduko de *Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo*, de Tibor Sekelj, kaj aliaj kroatoj kunvenus kun ni!

Anne Jausions, vicprezidanto de OSIEK

La konferencoj de OSIEK en Pekino en la jaro 2011.
Fotis Eric Laubacher



Ekde mia translokiĝo al Slovenio oni ofie min demandas, kial mi ne fariĝas sloveno, en Kroatio oni demandas min, kial mi defendas slovenojn, mi ja estas kroato... Ambaŭ postulas, ke mi decidu, ĉu mi estas unu aŭ alia. Nur esperantistoj neniam postulis de mi ŝanĝi mian nacian apartenon. Kontraŭe, ili eĉ tre interesigis pri ĝi.

Zlatko Tišljar

La supra citaĵo kvazaŭ resumas la filozofion de du elstaraj libroj de Zlatko Tišljar, eminenta promocianto de Eŭropo kaj de Esperanto en Eŭropo. Hazarde mi trovis reklamilon pri eseo, kiu tuj kaptis mian atenton. Tion sukcesis la ŝoka titolo: *Eŭropo, vi baldaŭ mortos**. Post mendo mi ege miris, ĉar ĝi aperis jam en 2005 kaj mi, kiel avida traserĉanto de novaj aperigoj, ĝin neniam rimarkis. Mi konfesu, ke tiuepoke la ideo de disfalo de Eŭropo ankoraŭ ne tiom akre esprimiĝis en la amaskomunikiloj. Post tralego mi ne iĝis pli optimisma koncerne la pluvivon de Eŭropa Unio, sed la aŭtoro sukcesis min persvadi, ke Esperanto „estintus“ – ĉu eble pli optimisme – „estus“ grava ilo por demokrata federacia Eŭropo. Necesus eĉ diri: eble la plej grava ilo. Ne malkredu!!! Legu la eseon!


Kroata samideanino atentigis min pri ĵus aperinta plia verko de Pajo (Zlatko Tišljar): *NEKŪTIME PRI MULTIO, Eseoj kaj artikoloj***. Ĝi konsistas en 78 artikoloj pri la temoj BIOGRAFIOJ - ESPERANTAĴOJ - FILOZOFIO/ETIKO - LINGVISTIKO - PEDAGOGIO - POLITIKO - RECENZOJ. Enestas eĉ du personaj poemoj. Tio signifas, ke la leganto povas adapti la legadon al la disponebla tempo kaj al siaj laŭtemaj preferoj.

Sciante ke Zlatko Tišljar naskiĝis en la jaro 1945 en Zagrebo (Kroatio), ke li studis en la filozofia fakultato pri la germana lingvo kaj socihumanisma informatiko, ke li estris la esperantistan entreprenon IKS (Internacia Kultura Servo) en Zagrebo, ke li tie organizis la Pupteatran Internacian Festivalon (PIF), ke li estis la motoro de la Zagreba Metodo adaptita al pli ol 30 lingvoj, ke li magistriĝis en 1995 pri kibernetiko ĉe la Internacia Akademio de Sciencoj San Marino, ke li estis membro de la Verda Partio de Slovenio kaj pinta aktivulo en EEU (Eŭropa Esperanto-Unio), vi certe komprenos, ke ĉi artikolaro estas ia vivmonumento de la erudicia samideano, ĝisosta esperantisto, kies esperantisteco tutnature integriĝas en sian ĉirkaŭaĵon, kiun li analizas plej akraŭde kaj racie. Ni nur esperu, ke ĉi libro ne restos lia lasta! Ja multegon ni povas lerni dank'al li! Krome: admirindas la laboro de liaj skipoj.

Edmond Ludwig

* *Eŭropo, vi baldaŭ mortos*, 2005, Zlatko Tišljar, 63 paĝoj

** *Nekŭtime pri multio, Eseoj kaj artikoloj*, 2015, Zlatko Tišljar – Pajo, Zagreb, 231 p. Eldonejo IZVORI



Ekde la komenco de la jaro 2016 Kroatio havas novan ĉefdelegiton de UEA - **Davor Klobuĉar** el Osijek. Lia adreso estas: Josipa Huttlera 27-A, HR-31000 Osijek, la poŝtelefono: + 385 (0)98 338 242 kaj UEA-kodo: dakl-o.

La antaŭa ĉefdelegito **Boris di Costanzo** el Opatija post dekjara diligenta servo deziris iom ripozi.

Davor Klobuĉar naskiĝis en 1961 en Osijek. Fininte bazan lernejon kaj gimnazion en Đakovo kaj studadon pri matematiko en Zagreb, li nun vivas en Osijek kaj laboras en Kroata Telekom kiel informatikisto.

Esperantistiĝis en 1983 en Studenta Esperanto-Klubo en Zagreb. Aŭtoro de populara matematika 950-paĝa libro *Matematika naša svagdaŝnja* (=Matematiko nia ĉiutaga) en 2012 kaj en 2014. Davor estas unu el tri vicprezidantoj de Kroata Esperanto-Ligo (KEL). Li redaktas jam 12 jarojn la TTT-paĝojn de KEL. Krom regulajn novaĵojn, li metis tien ankaŭ kurson de Esperanto laŭ la Zagreba metodo, skanitan kompletan de nia revuo Tempo (125 numeroj), sondosierojn de kelkaj esperantaj elsendoj de Radio Zagreb (el 1980-aj jaroj), Galerion de kroata esperanta historio ktp. Tio estas rezulto de lia longa esplorado de la kroata esperanta historio kaj propramane skanado de Tempo.

Liaj plej gravaj presitaj verkoj por nia movado estas: *Esperantski mozaik* (kroatlingva 320 paĝa informlibro el 2003 pri Esperanto kaj pri UK 2001 en Zagreb); *Pet latica iz Osijeka* (=Kvin petaloj el Osijek) - kroatlingva libro el 2009 pri lia plurjara esploro de la unuaj esperantistoj el Kroatio; *Sayonara, Japanio* (2008); *Slavonia arbaro* (traduko de la kroata novelo *Slavonska šuma* de Josip Kozarac); esperanta traduko de *Turisma mapo de Kroatio* kaj la turisma libreto *Zagreb kaj ĝia ĉirkaŭaĵo* (aperintaj en 2001 okaze de la UK); *Rakontoj sub la lito* - traduko de 19 infanaj rakontoj (premiita kiel Infanlibro de la jaro 2004 en Belartaj Konkursoj de UEA); *La morto de Smail-agao Ĉengiĉ* (historia prezento de tiu kroata beletraĵo en Esperantujo).

Davor estis la ĉefa loka organizanto de pluraj esperantaj eventoj en Osijek kaj partoprenato de UK-oj (Augsburg, Zagreb, Pekino, Jokohamo) kaj IJK-oj (Debrecen, Swanwick kaj Eringerfeld kaj parte Zagreb).

Se vi deziras esti membro de UEA, tiam UEA povos fieri pri unu membro pli, kaj iomete vi helpos ankaŭ finance per via kotizo. Certe nia tutmonda esperanta organizo tion meritas. Kia movado ni ja estus, se mondnivele ni ne havus unu organizon!? Pripensu, kaj kontaktu la novan ĉefdelegiton, aŭ, se vi tiel preferas, membriĝu mem per la interreto ĉe: www.uea.org

La plej interesaj kategorioj de membreco en UEA estas la sekvaj:

- **MG** Membro kun Gvidlibro plus la revuo Esperanto rete. La kotizo: 45 kunaĵojn,

- **MJ(-T)** Membro kun Jarlibro plus la revuo Esperanto rete kaj, ĝis inkl. 29 jaroj, membreco en TEJO kun Kontakto sen plia pago. La kotizo: 105 kunaĵojn,

- **MA(-T)** Membro-Abonanto, kiel MJ(-T) plus la revuo Esperanto. La kotizo: 265 kunaĵojn.

Vi povas pagi en kunaĵoj al Davor, post telefona, retpoŝta aŭ skriba interkonsento.

Esperantistoj el Bjelovar al sia urbo

Okaze de Tago de la urbo, bjelovaraj esperantistoj ankaŭ ĉi-jare, jam la kvaran fojon sinsekve, organizos sian tradician aranĝon "Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo". Sed ĉi-foje la aranĝo estas pli vizitinda ol kutime, ĉar dediĉita al la (ronda) 260-a datreveno de Bjelovar, kiu estis fondita de Maria Theresia en 1756. Kiel la motivo, same tiel la programo de la aranĝo, kiu okazos dimanĉe, la 23-an de oktobro, estos eksterordinara.

Por la unua fojo, la programo okazos en la Urba muzeo de Bjelovar. Jam antaŭ du jaroj bjelovaraj esperantistoj iniciatis la ideon, ke en la Urba muzeo de Bjelovar okazu ekspozicio de etnografiaj objektoj, kiujn dum siaj vojaĝoj kolektis la mondvojaĝanto, esploristo, humanisto kaj amiko de bjelovaraj esperantistoj - Tibor Sekelj. La ideo trovis bonan akcepton ĉe la bjelovara Urba muzeo kaj la Urba muzeo de Senta (Serbio), kiu posedas la kolekton de Tibor Sekelj. Laŭ la interkonsento de la muzeaj gvidantoj el Senta (s-ro Atlla Pejĵin) kaj Bjelovar (s-ro Tomislav Matić), en la ekspozicio oni prezentos ĉefe la objektojn el Aŭstralio kaj Papuo-Nov-Gvineo, kiujn Tibor kolektis dum sia vojaĝo en 1970 kaj 1971. Pro la fakto, ke la objektoj el Senta por la unua fojo prezentiĝos ekster la domicila muzeo, bjelovaraj esperantistoj plej afable invitas vin partopreni ĉi tiun eksterordinaran aranĝon.

Al Tibor Sekelj estos dediĉitaj ankoraŭ du programoj: prelegaro pri la vivo de Tibor Sekelj, en kiu parolos la plej bonaj konantoj de tiu temo, kaj prezento de la Esperanta eldono de "La papua taglibro", eldonota de DEC el Ĵurdevac.

Krom ĉio ĉi menciita, okazos ankaŭ la tradicia ekspozicio en la Popola biblioteko "Petar Preradović" kaj la 4-a deklamkonkurso, por kiu povas anonci sin ĉiujaj deklamantoj. Ne mankos muzikaj programoj kaj amika kunestado.

Bjelovaraj esperantistoj petas vin jam nun plani vian alvenon al Bjelovar la 23-an de oktobro ĉi-jare. Bonvolu anonci vian partoprenon ĝis la 10-a de septembro al esperanto.bjelovar@gmail.com

Grozdana Grubišić-Popović



Bjelovar -
renovigita
pavilono

Anstataŭ kongresi En Koreio, en 2017 festivalu en Kroatio!

La 102-a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en 2017 en Seulo (Koreujo), verŝajne por multaj eŭropanoj estos neatingebla celo. Sed ne malĝoju! Anstataŭ kongresi en Koreujo, venu festivali en Kroatio! Jam longe preparata, la novtipa Esperanto-festivalo INTER-FEST, kiu okazos inter la 6-a kaj 12-a de aŭgusto 2017 en Bjelovar, bonvenige malfermos al vi sian pordon! La festivalon kunorganizas kvar kroataj Esperanto-societoj: Bjelovara esperantista societo (DEB), Dokumenta Esperanto-Centro (DEC) el Ĵurdevac, Unuiĝo de prelegantoj de Esperanto (UPE) el Zagrebo kaj Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj (UZE).

INTER-FEST celas fariĝi rekonata eŭropa Esperanto-aranĝo kun vasta gamo da programoj, kiuj al neesperantista medio prezentos praktikan uzablaron de Esperanto kaj pere de tio instigos ĝian lernadon kaj instruadon. La programoj de INTER-FEST inkluzivos diversajn branĉojn de literaturo, teatro, muziko, filmo, sporto, klerigo, lingvolernado, interkultura interŝanĝo, turismo kaj aliaj aktivecoj, kiuj efektiviĝos per prelegoj, diskuttrondoj, seminarioj, koncertoj, prezentaĵoj, kon-kursoj, sportaj eventoj, kolokvoj, ekspozicioj k.t.p.

La unua festivala bulteno kun kotiztabelo kaj aliĝilo jam riceveblas en presita kaj elektronika formoj ĉe: bjelovar@gmail.com aŭ elŝuteblas en la retejo de UZE: http://zagreba-esperantisto.hr/index.php?option=com_content&task=view&id=332&Itemid=1

Aktualaj informoj pri la festivalo troviĝos en la jam funkcia festivala profilo ĉe fejsbuko: www.facebook.com/profile.php?id=100012333463163

Ne maltrafu la unuan, plej malmultekostan aliĝperiodon kiu daŭras ĝis la 31-a de decembro 2016, sed aliĝu tuj! La Loka Festivala Komitato ofertas al vi interesajn programojn, internacian etoson, familiecan amikaron kaj favorprezan loĝadon en Bjelovar!

Bonvenon!

Franjo Forjan

Esperantistoj en Bjelovar ekipas sian novan ejon

La 4an de junio 2016 prezidanto de Esperanto-Societo en Bjelovar **Franjo Forjan** kun la estraranino **Grozdana Grubišić-Popović** transprenis la Esperanto-librojn el la bjelovara Esperanto-biblioteko, kiujn Kroata Esperanto-Ligo gardis en siaj ejoj en Zagrebo en str. Knez Mislav 11, ekde la militaj tempoj kiam la esperanta vivo en **Bjelovar** provizore estingiĝis.

Ljerka Stilinović helpis por ke la libroj dum la milito ne pereu sed atingu la ejojn de KEL. Nun, kiam esperantistoj ricevis de la urbo **Bjelovar** la novan ejon en la strato **Ivan Vitez Trnski**, la libroj revenas hejmen.

KEL disponigis por la nova ejo de bjelovaraj esperantistoj kadrigitan afiŝon de **Vida Jerman** pri ŝia teatraĵo de **Miro Gavran** *La plej longa tago de Maria Teresa*, kreita por Universala Kongreso de Esperanto 2001 en **Zagrebo**.

Slovakio en la fokuso en la jaro 2016

Slovakio transprenos la 1an de julio prezidantecon de **Eŭropa Unio**. Pluraj niaj membroj vojaĝas al Universala Kongreso de Esperanto en **Nitra** de la 23a ĝis la 30a de julio 2016. La temo de la kongreso estas *Socia justeco – lingva justeco*.

D-ro **Jelena Lončarević** planas partopreni en Internacia Kongreso de Medicinistoj-esperantistoj en **Nitra**, okazonta antaŭkongrese. **Filip Šeatović** kaj **Laura Šeatović** estos helpantoj en Internacia Infana Kongreseto, kies ĉi-jara temo estos *Bestoj*. **Spomenka Štimec** dum UK prezentos literaturan temon *Renkontiĝo de la kroata kaj slovakaj ampoezio - Karesado antaŭ dormo*.

Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj veturos postkongrese al Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj. Esperanto-Societo **Trixini** el **Hraščina** financas la partoprenon de juna membro **Marija Sentkiralj**.

Sed ne ĉiuj iros al **Nitra**: **Tihana Mikša** direktiĝas al Internacia Junulara Kongreso en **Wroclaw** en **Pollando**.
S.Š.



D-ro Velimir Piškorec, orda profesoro ĉe la katedro pri la germana lingvo de la Fako germanistiko en la Filozofia fakultato de Universitato en Zagrebo riĉigis sciencan literaturon en Esperanto per eldono de la libro *Tomo Maretić en interkruciĝo de filologio kaj lingva politiko*. Li verkis sian studon pri la fama kroata lingvisto en la kroata lingvo kunlabore kun kroatistino kaj pedagogino **Sanja Janković**. La verko estis paralele eldonita en du apartaj volumoj, la kroata kaj la esperanta. La esperantan tradukon prizorgis lia ĉiama instruisto pri Esperanto **Josip Pleadin**. La titolo de la kroatlingva originalo estas *Tomo Maretić na raskrižju filologije i jezične politike*.

La verko sur 118 paĝoj prilumas la filologon **Tomo Maretić** kaj lian tempon. **Tomo Maretić** naskiĝis en **Virovitica** la 13an de decembro 1854 kaj mortis en januaro 1938. **Sanja Janković** same naskiĝis en **Virovitica** kaj preskaŭ jarcenton kaj duonon poste kaj esploras la verkon de sia samurbano el la vidpunkto de sciencisto de la 21a jarcento, analizante la edukadon de **Maretić**, profesion agadon kaj metante lin en la medion de la kroata politiko de la 19a jarcento.

La aŭtoroj en sia libro prezentas la verkaron de **Maretić** kaj lian privatan kaj publikan personecon kaj tute aparte analizas lian verkon *Pensoj pri artefarita mondlingvo* el la jaro 1892. Tiujn Pensojn D-ro **Tomo Maretić** kiel orda membro de Jugoslavia Akademio de la Sciencoj kaj Artoj legis en la solena kunsido de la akademio 10an de decembro 1891. Liaj *Pensoj* estis publikigitaj en 1982. La studo verkita en la kroata ne atingis multajn legantojn. La teamo **Piškorec-Janković** diskonigas la opiniojn de **Maretić**, li estas unu el malmultaj filologoj de sia tempo kiu okupiĝis pri la lingvistika fenomeno nuntempe nomata lingva inventismo - planlingvoj.

La du volumojn eldonis Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj en 2015. S.Š.

Paul Gubbins en Renkontiĝo de verkistoj en Hraščina

Bonvenon al la 14a Renkontiĝo de verkistoj kaj tradukistoj en **Hraščina** la 17an de septembro 2016. Nia ĉefa gasto estos en 2016 verkisto kaj redaktoro **Paul Gubbins** el **Britio** kaj lia anglalingva antologio pri la esperanta literaturo *Star in the night sky*/Steloj en nokta ĉielo. **Gubbins** estas la aktuala redaktoro de la gazeto *Monato*. **Gubbins** prezentos al ni la kroatajn verkistojn en sia antologio. Ni traktas kun publicisto **Slavko Goldstein** por ke li prezentu al ni sian patron, esperantiston kiu pereis en 1941 kaj al kiu li dediĉis la ĉapitron en sia kroatlingva libro *1941 – la jaro kiu revenas*. En la programo estas ankaŭ prezento de la verko de **Hansjörg Kindler – Trixini**. Virina teamo kun **Olga Ŝtajdohar Pađen** prezentos libron kiu kroatlingve rakontas pri kio fieras 66 virinoj. Al la publiko ni ekspoziciis ankaŭ la lastatempe akiritan rarajn afiŝon pri Universala Kongreso de Esperanto en 2014 en **Parizo**.

Esperanto-Societo Trixini prezentos al ni siajn klopodojn pri starigo de memortabulo sur la domo en kiu Nobelpremiito **Ivo Andrić** finverkis sian unuan poemaron *Ex ponto* en 1918.

S.Š.

760. Emilija Obradović	26,60 eŭroj
761. KEL - anstataŭ florkrono por la tombo de Lucija Borčić	53,33 eŭroj
762. Davor Grgat	9,33 eŭroj
763. Nikola Vidić	13,30 eŭroj
764. Božena Perković	13,30 eŭroj
765. Zlatko Hinšt	13,30 eŭroj
766. Roža Brletić – Višnjic	6,60 eŭroj
767. Marta Dokić	4,00 eŭroj
768. Željko Gubijan	20,00 eŭroj
769. Ivo Osibov	13,30 eŭroj
770. Katja Osibov	13,30 eŭroj
771. Spomenka Štimec	20,00 eŭroj
772. Ivan Rašić	33,33 eŭroj
773. Ankica Janković	10,00 eŭroj
774. Goran Lakotić	13,30 eŭroj
775. Darinka Sović	26,60 eŭroj
776. Marija Kvakić	6,66 eŭroj
777. Vanja Radovanović	26,60 eŭroj
778. Bojana Đuričić	13,30 eŭroj
779. Mladenka Đaković	20,00 eŭroj
780. Jagoda Latinović-Čaldarević	6,66 eŭroj
781. Josip Brkanac	20,00 eŭroj
782. Olga Srkoč	6,66 eŭroj
783. Dinka Šimunić	13,30 eŭroj
784. Jelkica Glumičić	13,30 eŭroj
785. Blanka Pavlović-Devčić	173,33 eŭroj
786. Zlata Nanić	40,00 eŭroj
787. Olga Ŝtajdohar-Pađen	48,00 eŭroj
788. Đivo Pulitika	40,00 eŭroj
789. KEL - anstataŭ floroj sur la tombo de Stanko Rukelj	53,33 eŭroj
790. KEL - anstataŭ floroj sur la tombo de Dinko Matković	53,33 eŭroj
791. Božidar Brezinščak Bagola	20,00 eŭroj
792. Boris Di Costanzo	13,33 eŭroj
793. Damir Mikuličić	22,66 eŭroj
794. Đurđa Štokić	13,30 eŭroj
795. Melanija Grgić	66,66 eŭroj
796. Davor Klobučar	186,17 eŭroj
797. Anonima	120,00 eŭroj
798. Anto Mlinar	80,00 eŭroj
799. Siniša Dvornik	20,00 eŭroj
800. Ljerka Stilinović	5,33 eŭroj
801. Dalibor Ŝeatović	1,33 eŭroj
802. Vera Roknić	18,66 eŭroj
Sume	1.386,17 eŭroj

Inter oktobro 2015 kaj junio 2016 estis de niaj membroj kolektitaj 1.386,17 eŭroj. Ekde la jaro 2003 ni kolektis inter niaj membroj kaj amikoj 47.137,30 eŭrojn.

Nia lasta kredito al Esperanto-Societo „Trixini“ estas 11.663,31 eŭroj!

Dankon al la membroj kiuj helpis al ni havi la propran Esperantejon en Zagrebo!

Nia banknumero en Raiffeisenbanko: Hrvatski savez za esperanto IBAN HR6124840081100881157.

La estraro dum la aprila kunveno decidis ankoraŭ ne translokiĝi al Vodnikova. En niaj ejoj daŭre loĝas subluantoj, helpantaj al niaj financoj.

Memorigo:

Kiam ni aĉetis nian ejon en Vodnikova 9 en la jaro 2003, ni pagis por la ejo 108.000 eŭrojn. Ni devis pagi aldone la imposton de 5.000 eŭroj. Sume ni pagis 113.000 eŭrojn.

Kiel ni plibonigis nian ejon en 2016?

En 2016 ni riparigis la kamentuban pordon en la banejo. Ni farbigis unu plian pordon. Restas farbendaj kvar malpli grandaj fenestroj kaj kvar pordoj.

Finiĝis la inspiroplena vivo de Lucija Borčić

Lucija BORČIĆ naskiĝis la 26-an de julio 1921 en Podšpilje, insulo Vis. Ŝi mortis en Zagrebo la 14-an de novembro 2015. Ŝi estis librotenistino kaj administratoro, kroata esperantistino, tradukinto kaj Esperanto-vortaristo.

Esperanta agado

Borčić dum 20 jaroj, antaŭ la emeritiĝo, estis oficejestro de la Plastikarta asocio por Kroatio. Ŝi esperantistiĝis en Zagrebo en 1940. Ekde 1946 ŝi aktivis en la Esperanto-societo "Bude Borjan" en Zagrebo, kie ŝi plenumis la funkciojn de komitatano, kasisto, sekretario kaj prezidanto kaj laŭ la propra rekta metodo gvidis plurajn elementajn, konversaciajn, progresigajn kaj lingvajn kursojn, prelegis, aktorin, lektorin. En Kroatia Esperanto-Ligo kaj Jugoslavia Esperanto-Federacio ŝi plenumis la funkciojn de dua sekretario kaj membro de la Ekzamena komisiono. En 1953 ŝi kunorganizis la 38-an Universalan Kongreson de Esperanto en Zagrebo plenumante plurajn funkciojn. Ekde 1952 Borčić tradukas el la kroata al Esperanto kroatan prozon kaj poezion kaj ekde 1977 ŝi verkas originale en Esperanto.

Tradukoj

Libroforme aperis la tradukoj de: Antun Ŝimunić ("Elprovado de amo", 1985), Stjepan Planić ("Loĝkulturo", Osijek, 1985), Edvard Kardelj ("Socialisma memstrado", Sarajevo, 1986), Ante Vladisavljević ("Vestokulturo", Osijek, 1987), Yüksel Söylemez (el la angla, "Amo estas taso da kokidsupo", Zagreb, 1994), Mile Prpa ("Reĝo de l' leonoj", Zagreb, 1993 kaj "Elemento de l' elementoj", Zagreb, 1995), Pero Ĉimbur ("Mi resanigis PPPetron", Eldonejo Harald Schicke, Germanio, 1995), Vesna Parun ("La bluoj" - poemaro, Zagreb, 1999).

Ŝi kuntradukis la verkojn: "Jugoslavio kaj ĝiaj popoloj" (JEL, Ljubljana, 1953), "Kroata poezio" (IKS, Zagreb, 1983), "Kantoj de l' silento" (de Zora Heide, Stockholm, 1984), "Soifo" (de Ivo Andrić, ELBIH, Sarajevo, 1988), "Moderna bosnia-hercegovina novelo" (Sarajevo, 1989), "Poemaro de kroatoj en Hungario" (KEU, Zagreb, 1992), "Izolulo" (poemoj de kroataj poetoj tradukitaj el Esperanto en dek kvin lingvojn, Zagreb, 1993), "Antologio de kroataj unuaktaj dramoj" (KEL, Zagreb, 1997), "En tiu terura momento" (KEL, Zagreb, 1998), "Barkoj el akvo - elektitaj kroataj noveloj" (IKS, Zagreb, 1998). Tradukoj el Esperanto al la kroata: "Unutra i vani" (Marjorie Boulton, aperinta en "Sve dugine boje", IKS, Zagreb, 1988). Tradukis kvar prospektojn pri la urbo Zagrebo.

La tradukoj eldonitaj de Kroata esperantista unuiĝo

1992.: "Poemaro de kroatoj en Hungario" / "Pjesništvo Hrvata u Mađarskoj" (Stipan Blažetin,



Marko Dekić, Mijo Karagić, Đuro Pavić, Lajoš Škrapić) 2006: "Rakontoj el Vukovar" ("Priče iz Vukovara") de Siniša Glavašević 2006.: "Poemaro de la burglandaj kroatoj"/"Pjesništvo gradišćanskih Hrvata"(Mate Meršić Miloradić, Ivan Blažević, Ferdinand Sinković, Mate Sinković, Lajoš Škrapić, Ivan Horvat, Matilda Bolcs, Peter Tyran, Dorotea Zeichmann, Timea Horvat, Franc Rotter) 2007.: "Poezio de molizaj kroatoj"/"Pjesništvo moliških Hrvata" (zajednički prijevod sa Zorom Heide: Josip Barač, Gabriele Blaschetta, Giuseppe Cicanese, Giovanni de Rubertis, Angelo Genova, Enrico Giorgetta, Mario Giorgetta, Rocco Giorgetta, Leopoldo Lalli, Milena Lalli, Emilio Ambrogio Paterno, Lucio Piccoli, Pasquale Piccoli, Gabriele Romagnoli, Antonio Sammartino) 2008.: Ŝimun Ŝito Ĉorić "Nije sve što oči vide" – "Granice su da se prijedu" – vojaĝ-kronikoj 2009.: Ivan Golub "Lumo kaj ombro" / "Svjetlo i sjena" (kuna traduko kun Zora Heide kaj Marija Belošević) 2011.: Ljubica Kolarić-Dumić "Ususret svojoj zvijezdi" / "Renkonten al sia stelo",

La lasta traduko

Ŝia lasta traduko, tiu de la junulara romano "Jaša Dalmatin" de la kroata verkistino Ivana Brlić Mažuranić, finita ĉ. du jarojn antaŭ la morto, ne estas ankoraŭ publikigita. La unuan ĉapitron publikigis Kroata Esperanto-Ligo en sia gazeto Tempo en decembro 2013. Vidu ĉe la adreso: tempo_12_2013.pdf (la paĝo 10).

Originalaj Esperanto-poemoj

Originalaj Esperanto-poemoj aperis en: "Kroata Esperanto-poemaro" (IKS, Zagreb, 1991), "Jubilea versgirdando" (ZEL, Zagreb, 1990). Unuopaj originalaj kaj tradukitaj poemoj aperis en la periodaĵoj "La Suda Stelo", "Tempo", "Voĉo", "Velo", "Kroata esperantisto", "Monato", "Fonto", "Literatura foiro", "Esperanto en Skotlando", "Sennacieca revuo".

En 2001 aperis libroforme, eldonita de IKS (Internacia Kultura Servo) en Zagreb, ŝia kolekto de originalaj poemoj "Pulsas la viv".

Aliaj verkoj

Per artikoloj Borčić kontribuis al "La Suda Stelo", "Esperanto", "Heroldo de Esperanto", "El Popola Ĉinio", "Tempo", "Voĉo", "Heliko". Ŝi redaktis la lingvajn rubrikojn en "Voĉo" kaj "Tempo", lektorin la revuojn "Voĉo", "Tempo", "Kroata esperantisto" kaj plurajn verkojn kaj Esperanto-tradukojn de kroataj kaj makedonaj esperantistoj. Post la forpaso de Marinko Gjivoje ŝi finredaktis la "Leksikonon de aktivaj jugoslaviaj esperantistoj" (1985).

Leksikografio

Borčić verkis la ĝis nun plej ampleksan vortaron Esperanto-kroatan kun pli ol 400 paĝoj kaj 41.000 vortoj, kiu aperis en 2009. Ĝi baziĝas sur PIV 2002/2005, sed parte ankaŭ transpasas ties vort-trezoron. Alidirekta vortaro kroata-esperanta aperis en 2010.

Honorigoj

Borčić ricevis la premion "Clelia Conterno" por poezio 1985 pro la poemo "Artist' blua". Ŝi estas plujara membro kaj delegito de Universala Esperanto-Asocio kaj membro de Esperantista Verkista Asocio kaj Akademio Literatura de Esperanto. Honora membro de UEA ekde 2001 kaj de Kroata Esperanto-Ligo.

Kompilis Davor Klobučar

Parolado de Spomenka Štimec ĉe la adiaŭo al Lucija Borčić en la zagreba tombejo Miroševac. La 17an de novembro 2015

Ni adiaŭas hodiaŭ de la kroata esperantistino **Lucija Borčić**. Ŝi estis tradukistino, leksikografo, poetino, redaktorino kaj poligloto. Ŝi meritiĝis por la kroata kulturo plej multe per kreado de la du plej grandaj esperantaj vortaroj en la historio de Esperanto en **Kroatio**, *Granda vortaro esperanta-kroata* kaj *Granda vortaro kroata-esperanta*, kiujn ŝi finpretigis por la presado en 2008 kaj 2009 kaj kiujn eldonis Kroata Esperanto-Ligo kaj Sveučilišna knjižara. Ni ĝojas ke Luci povis vidi la libroformajn rezutojn de sia giganta milpaĝa laboro. Ŝi por ni difinis en siaj vortaroj preskaŭ 100.000 kapvortojn en du lingvoj kiujn ŝi plej multe ŝatis, la kroata kaj Esperanto.

Lucija Borčić estis honora membro en du asocioj al kiuj ŝi dumvive apartenis: Universala Esperanto-Asocio kaj Kroata Esperanto-Ligo. Ŝi membris en Esperantligva Verkista Asocio kaj poste en Akademio Literatura de Esperanto.

Ŝi naskiĝis en la bonodoroj de **Podšpilje** apud **Komiza** sur la insulo **Vis** en 1921. La tutan vivon ŝi oficis en **Zagrebo**, dividante sian vivon inter du artoj, literaturo kaj pentroarto. Ŝi tre lerte dumvive sekretariis en la faka asocio de kroataj pentristoj kaj skulptistoj. Luci havis ekstreme lertajn manojn. Ekde sia plej juna tempo ŝi mem estis artistino, kreante per fadeno kaj lano. La tutan vivon ŝi ĉirkaŭis sin per artaĵoj. El ĉiuj artaĵoj ŝi plej multe amis Esperanton, kiun ŝi lernis de sia patro en 1940, antaŭ 75 jaroj. Ŝia kono de Esperanto estis tiom nuancigita ke ŝi povis fariĝi instruistino eĉ al lingvisto **Dalibor Brozović** aŭ ke ŝi povis esperantigi el la malnova dialekto de **Dubrovnik** la verkon de **Marin Držić**.

Lucija Borčić estis la kolono de la Esperanto-Movado en **Kroatio**, la neforgesebla motoro de la **Universala Kongreso de Esperanto en Zagrebo 1953** kaj la animo de la zagreba Esperanto-Societo Bude Borjan kaj Kroata Esperanto-Ligo. Se kroataj esperantistoj havas bonan reputacion en la internacia Esperanto-Movado, tion ni ŝuldas ankaŭ al la fajnsenta **Luci**.

Kara Luci,
dankon pro ĉio pri kio vi instruis nin, pri la lingvo kaj ĝia riĉo kaj ĝia amikeco. Dankon pro literaturaj paĝoj kiujn vi esperantigis, dankon pro la golfo de **Vis** kiun vi dividis kun ni. Kaj antaŭ ĉio dankon pro via amo al Esperanto, kiun ni de vi heredis. Post vi Esperanto plue vivos en ni. Ripozu en paco!

S.Ŝ.



Lucija Borčić en sia loĝejo subskribas la vortaron por Mirjana Žeželj

STANKO RUKELJ

(1944 -2016)

Stanko Rukelj dum multaj jaroj prezidis Esperanto-Societon *Božidar Vančik* en **Varaždin**. Li naskiĝis en la vilaĝo **Majerje** ĉe **Petrijanec** la 18an de aprilo 1944 kaj mortis tie la 25an de januaro 2016. Li vivis kiel agrikulturisto kaj bovbredisto. Esperanto por li estis granda fenestro al la mondo. Tradukado kaj komputilado estis liaj hobiaj. Libroforme aperis lia traduko de **August Senoa** *La dianto de sur la poeta tombo*. Kiel tradukisto li kontribuis al la libroj de **Tibor Sekelj** De Patagonio ĝis Alasko kaj Tra la lando de kanguroj. Sian tradukojn li publikigis en cifereca formo: *La dianto de sur la poeta tombo* kaj la ampleksajn *Surprizitaj nuptofestantoj* de **Eugen Kumičić**. Li ciferecigis ankaŭ la romanon *La trezoro de l' oraĝisto* de **August Senoa** (en historia esperanta traduko de **Fran Kolar** el 1911) kaj du tradukojn de la verko de **Ivan Mažuranić** *La morto de Smail-agao Ĉengiĉ*, tiujn de **Mavro Špicer** kaj **Josip Velebit**.

Lia tombo estas en la tombejo en **Petrijanec**. Kun li finis sian vivon ankaŭ la Esperanto-Societo *Božidar Vančik* en **Varaždin**.

S.Ŝ.



Foto: Davor Klobučar

DINKO MATKOVIĆ

(1925 -2016)

La 24an de februaro Dinko Matković el **Vrboska** sur la insulo **Hvar** mortis en **Split**. Li naskiĝis en **Vrboska** la 10an de junio 1925. Profesie instruisto pri la angla lingvo, li instruis Esperanton en diversaj urboj kie li postenis kaj partoprenis kun siaj lernantoj en la pedagogia projekto *Grajnoj en vento*.

Lingve fajnsenta **Matković** havis specialan emon al aforismoj kaj en Esperanto publikigis ilin libroforme en *Cerbaj impulsoj* en **Zagrebo** kaj *Verdeskaj pensoj* en **Pollando**.

S.Ŝ.



Aforismoj de Dinko Matković

Eĉ guto malgranda konstante frapante kaŭzas – kapdoloron.
Sen tombotabulo vi ne povas eniri paradizon.
Kiam venos la ora tempo – rusto malaperas.
Pli facile konfesi al pastro ol al impostisto.
En la komenco estis la Adama vorto kaj la Eva repliko.
El ĉiuj monatoj la plej bela estas – la miela.



Lucija Borčić

Artist' blua

Maro regas.
Satanegas
ondohordo
al rokbordo.
Bruas, tondras,
true sondas
rokomuron
dum vetkuro.
Alten soras
klifojn boras.
Ekvoluptas.
Ŝtonen skulptas
formojn mirajn
nombre milajn.

Boton, birdon,
heroŝildon,
cervokornon,
virinformon,
reĝan tronon,
in-kalsonon,
virkranion,
hindan dion...
Super truo
form' de gruo.
Punt' ĉe punto,
milmil punktoj.

Pont' enmezas
kaj impresas maren
gliti
groton spiti.
Kaj en groton
sub ŝtonboto
tra truaro
en la maro
sunradio
(ho, defio!)
ŝteleniris.
Hom' ekmiris
pri gamravo
en la kavo.

Kun herbkuno
en mar' lumo

disalternas,
game sternas
lumoludon
en marnudon:
buntkoloro
arĝent-ore
verde-blue,
poŭpe, prue,
jen lazure,
jen purpure.


Altirita,
de l' ĝu' rita
hom' ennaĝis
por omaĝi
per ĉeesto
akvofeston.
Homon maro
kaj ondaro
danke dotas:
perlamotas.

Dance kreskas
fosforeskas
la surfaco
per senlaco.

Okul' gapas
maro frapas,
feste nuptas,
lude skulptas,
nestojn kovajn
formojn novajn.

Ĉiam plue
frapoflue
artist' blua,
skulptis' skua
sin rejetas
kaj impetas
per agreso
ĝis ŝtormĉeso.

Pritišćina, 1990



Golfo Pritišćina, insulo Vis. La domo de Lucija Borčić (la plej supraj fotoj).

Fotis Ivan Špoljarec - Štef